# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

N-ro 30 Januaro 1929

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE



**47a Kunsido de la Adm. Konsilantaro de l'I.L.O. — Vojaĝo de la Direktoro al Ekstremoriento. — I.L.O. kaj la oficistoj. — Ses novaj konfirmoj de Internaciaj Laboraj Konvencioj. — Paĝo pri kooperado.**


### La 47a Kunsido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo

Dum sia 42a kunsido okazinta en Warszawa, de la 5a al la 8a, kaj en Krakow la 10an de Oktobro, la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo konsideris la agadon farotan sekve de la rezolucioj akceptitaj de la Internacia Labora Konferenco en ĝia lasta kunsido (Majo-Junio 1928).

La rezolucio pri akcidentoj en fervojoj okaze de jungado okazigis longan diskutadon. Tiu rezolucio, oni scias, petas, ke la Konsilantaro nomu komunan komitaton de reprezantantoj de Registaroj, mastroj kaj laboristoj por studi la demandon pri la uzo de aŭtomataj jungiloj, sin informi pri la rezultatoj akiritaj de la Internacia Unuiĝo de Fervojoj kaj fari raporton kiel eble plej baldaŭ. Oni demandis, ĉu la Konsilantaro devas tuj starigi la komitaton aŭ ĉu konvenas atendi, ĝis kiam la studoj de la Internacia Unuiĝo de Fervojoj plie progresis.

Fine la Konsilantaro komisiis al la Direktoro, ke li rilatiĝu kun la Internacia Unuiĝo, memorigu ĝin pri la rezolucio de la Konferenco kaj sciigu ĝin, ke la Konsilantaro intencas starigi la komitaton en tre baldaŭa kunsido, kaj ĉiuokaze antaŭ la fino de 1929.

Viva diskutado ankaŭ okazis pri la rezolucio pri laborkondiĉoj en la teksindustrio. La demando estis pri la konsekvencoj de rezolucio akceptita de la Konferenco, kiu atentigas al la ekonomiaj malfacilaĵoj aperintaj en la diversaj fakoj de la teksindustrio en la tuta mondo, kaj petas al la Konsilantaro, ke ĝi konsideru la oportunecon, entrepreni studon pri la salajroj, laborhoroj, higienaj kaj aliaj laborkondiĉoj de la viroj, virinoj kaj infanoj laborantaj en la teksindustrio en la diversaj landoj.

Pluraj membroj de la mastra grupo disputis la oportunecon de tia enketo. Ili diris, ke la cirkonstancoj ne vere pravigas ĝin kaj ke ĝia efikeco estas tre duba, ĉar iuj mastraj organizaĵoj, dezirante rezervi al si plenan liberecon, rifuzus kunhelpi en la esploradoj de la Oficejo.

En la nomo de la laborista grupo, S-ro Jouhaux, kontraŭstaris tiun sintenon. La reprezantantoj de la mastroj, li diris, ĉiam ripetas, ke la enketoj de la Oficejo devas fariĝi kun la helpo de la koncernataj organizaĵoj. Hodiaŭ ili utiligas la fakton, ke iuj mastraj organizaĵoj ne volas kunlabori en ĉi tiu enketo, por konkludi, ke la enketo devas ne fariĝi. Li rememorigas, ke la parto XIII de la Packontrakto komisiis al la Internacia Laboroficejo fari konstantajn enketojn pri ĉiuj aspektoj de la laborista vivo: salajroj, laborhoroj, higieno, senlaboreco, k.t.p. Kontraŭe de la tezo de la mastroj, li asertis, ke la aktuala situacio de la teksaj industrioj en multaj landoj bezonas seriozan kaj ĝisfundan studon. Strikoj okazis preskaŭ ĉie; ili okazas ankoraŭ, ekzistas senlaboreco. Li konkludis dirante, ke la Internacia Laboroficejo malplenumus ĝian mision, se ĝi seninteresiĝus pri tiuj problemoj.

Finfine, laŭ propono de S-ro Sokal, reprezentanto de la Pola Registaro, aprobata de la tuta Registara grupo, la Konsilantaro decidis, starigi komitaton, kiu devos en la sekvonta kunsido de la Konsilantaro, fari proponojn pri la temoj de la enketo, interalie, la fakoj de la industrio, kiuj devas esti ekzamenataj, kaj la demandoj, kiuj devas esti studataj, ekzemple, laborhoroj, protekto de infanoj, kaj virinoj, salajroj, vivkosto, produktokosto, higieno, k.t.p.

La Konferenco, en sia lasta kunsido, komisiis al la Administra Konsilantaro la studon de la tuta problemo pri oficialaj lingvoj, laŭ la teknika kaj laŭ la financa vidpunkto. La Konsilantaro ekzamenis la metodojn por efektivigi tiun rezolucion. Ĝi decidis starigi specialan komitaton de dekdu membroj (kvar el ĉiuj grupoj: Registaroj, mastroj kaj laboristoj) por prepari raporton al la Konferenco pri oficialaj lingvoj.

Konforme al la propono de la Komuna Mara Komisiono, la Konsilantaro decidis, enmeti en la tagordon de la Mara Konferenco en 1929 la demandon pri la starigo, en ĉiu apudmara lando, de minimumaj kondiĉoj pri profesia kapableco, kiuj devas esti postulataj por navigacioficiroj en komercaj ŝipoj. Oni scias, ke ĉi tiu problemo estis proponita de la Internacia Asocio de Oficiroj de la Komerca Ŝiparo, sekve de la afero pri la Franca ŝipo « Lotus ».

Antaŭ ol fari definitivan decidon pri la tagordo de la Konferenco en 1930, la Konsilantaro petis la Direktoron, ke li prezentu raporton pri la leĝoj kaj praktiko en la diversaj landoj rilate al la demando pri la limigo de la pezo de portaĵoj kaj la demando pri la aĝo por la servigo de infanoj en komerco. En sia sekvonta kunsido la Konsilantaro decidos pri la enmeto de tiuj demandoj en la tagordon de la Konferenco en 1930.

Fine, por plenumi la dezirojn, plurfoje esprimitajn de la delegitoj de la Ekstremoriento al la Internacia Labora Konferenco kaj por montri la universalan karakteron de la Organizaĵo, la Konsilantaro unuanime aprobis la projektitan vojaĝon de la Direktoro al tiu regiono, por fari, la unuan fojon, senperan kontakton kun tiuj malproksimaj popoloj, kiuj ĉiam montris tre vivan intereson pri la agado de la Internacia Laboroficejo.

Ĉar la Direktoro ne povos reveni antaŭ Februaro, la Konsilantaro decidis prokrasti sian sekvontan kunsidon ĝis la 11a de Marto.

La Konsilantaro starigis la 30an de Majo, kiel daton por la malfermo de la ĝenerala kunsido de la Konferenco en 1929 kaj la 10an de oktobro, kiel daton por la malfermo de la speciala mara kunsido.

## La vojaĝo de la Direktoro al Ekstremoriento

S-ro Albert Thomas, Direktoro de la Internacia Laborficejo, foriris el Genève la 31an de Oktobro, por viziti Ĉinujon, Japanujon kaj kelkajn aliajn landojn en la Ekstremoriento. Li alvenos en Peking ĉirkaŭ la 17a de Novembro kaj poste izitos Hankow, Nankin kaj Shanghai. Li rilatiĝos kun la dministraroj kaj la nova Registaro, kiu jam sciigis al li sian itereson pri tiu vojaĝo kaj sian deziron por sin okupi pri la roblemoj de laboro kaj socia leĝdonado.

S-ro Thomas alvenos en Japanujo je la komenco de Decemro. La Japana Registaro kaj la grupoj, kiuj organizas la proramon, intencas, ke la vizito daŭru tri semajnojn. En Japanujo, ame kiel en Ĉinujo, la Direktoro interparolos kun la membroj e la Registaroj kaj la administrestroj koncernataj pri laboremandoj. Li kontaktiĝos ankaŭ kun la plej reprezentaj orgaizaĝoj de mastroj kaj laboristoj. Li ekzamenos, konsulte kun a koncernataj aŭtoritatoj, la situacion de la Ŝtato pri la konencioj akceptitaj de la Internacia Labora Konferenco, kaj ı eblecon de novaj konfirmoj.

Revenante de Japanujo, la Direktoro, laŭ invito de la Nederlanda Registaro, faros mallongan viziton al Nederlanda lindujo.

## La Internacia Laboroficejo kaj la Oficistoj

Reprezentantoj de la plej gravaj asocioj de oficistoj kunenis lasttempe en Genève, laŭ invito de la Direktoro de la nternacia Laboroficejo, por diskuti diversajn problemojn studaajn de la Oficejo kaj speciale interesantajn la oficistojn.

La demandoj diskutitaj ampleksas tiun pri la laborhoroj de ficistoj, pri kiu la jena rezolucio estis akceptita:

« La organizaĵoj de oficistoj notis kun kontento la aranĝojn aritajn rezulte de la rezolucio akceptita en la Deka Kunsido le la Internacia Labora Konferenco pri la internacia reguligo e laborhoroj de oficistoj.

La teknika esplorado farata de la Internacia Laboroficejo, aj la decido de la Administra Konsilantaro por enmeti la deıandon en la tagordon de la Konferenco, konsistigas gravan aŝon al la realigo de la deziroj de la oficistoj.

Oni petas la Internacian Laboroficejon, ke ĝi daŭrigu siajn lopodojn por akceptigi Konvencion pri maksimuma labortago n komerco kaj en establaĵoj kaj alministrejoj, kie tia reguligo e ankoraŭ ekzistas. La kunveno deziras, ke la intencita Konencio ampleksu oficistojn per taŭga difinado. »

Oni ankaŭ akceptis rezoluciojn pri libertempo kun salajro, rofesia lernservo kaj edukado, la protekto de salajrataj elpenantoj, la pago al komercovojaĝistoj kaj agentoj kaj la kondiĉoj ontraŭ konkurado en dungokontraktoj.

Rezolucio estis ankaŭ akceptita esprimanta la esperon ke la nternaca Laboroficejo starigu konstantan komitaton por la disuto de demandoj speciale interesantaj oficistojn.

## ˆes novaj konfirmoj de Internaciaj Laboraj Konvencioj

La Internacia Laboroficejo estas sciigita pri kvin novaj konrmoj de konvencioj.

Aŭstrujo konfirmis la Konvencion pri Kompenso pro proesiaj malsanoj kaj la Konvencion pri Egaleco de traktado por aciaj kaj fremdaj laboristoj pri kompenso pro laborakcidentoj, onvenciojn akceptitajn de la Internacia Labora Konferenco n ĝia Sepa Kunsido (Genève, 1925).

Japanujo konfirmis la du supreनomitajn konvenciojn kaj ankaŭ la Konvencion pri la simpligo de la inspektado de elmigrantoj surŝipe, akceptitan en la Oka Kunsido (Genève, 1926).

Nederlando konfirmis la Konvencion pri Kompenso pro profesiaj malsanoj.

Ĉi tiuj ses konfirmoj faras la nombron da konfirmoj oficiale registritaj de internaciaj laboraj konvencioj 333.

## La Konsulta Komitato pri Intelektaj Laboristoj

La unua kunveno de la Konsulta Komitato pri Intelektaj Laboristoj, Komitato lasttempe nomita de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo, okazis en Genève la 22an kaj 23an de Oktobro. Tiu Komitato kunlaboros kun la Komitato pri Intelekta Kunlaboro de la Ligo de Nacioj.

La Komitato ekzamenis la demandon pri kondiĉoj kontraŭ konkurado en dungokontraktoj. Ĝi unuanime opiniis, ke ĉiu kondiĉo en dungokontrakto, kiu malpermesas al la dungito post la fino de lia kontrakto, ke li ekspluatu alian entreprenon, aŭ sin asociu al la ekspruatado de alia entrepreno, aŭ sin dungigu kun alia dunganto, devas esti limigita al la protekto de la justaj interesoj de la dunganto kontraŭ malprofito kaŭzita per la malkaŝado de profesiaj sekretoj aŭ la utiligo de specialaj informoj akiritaj de la dungito per lia servado. La Komitato decidis peti la Administran Konsilantaron, ke ĝi studu tiun demandon por eventuala konvena agado.

La Komitato akceptis rezolucion petantan la Internacian Laboroficejon, ke ĝi konsultu la direktorojn de teatroj kaj la aktorojn kaj ankaŭ la dungoficejojn por aktoroj, pri la demando, ĉu konvenas apliki al teatraj establaĵoj la principojn de la Washingtona Konvencio kaj Rekomendo pri Senlaboreco celantajn la starigon de publikaj, anstataŭ prvataj, dungoficejoj.

La Komitato aprobis la planon proponitan de la Internacia Laboroficejo por la preparo de raporto pri senlaboreco ĉe nemanlaboristoj. Ĉiuj partoj de tiu raporto speciale interesantaj la Internacian Instituton pri Intelekta Kunlaborado estas traktataj kune de la du institucioj.

La Komitato pritraktis demandon tre gravan por la Gazetaro, nome, la demandon pri la profesia konscienco de ĵurnalistoj. La ĵurnalistoj estas ĉiam elmetataj al la risko de kontraŭeco inter iliaj personaj opinioj kaj tiuj de ilia ĵurnalo. Ĉi tiu risko pligrandiĝas, se la politiko de la ĵurnalo ŝanĝiĝas. La Komitato rekomendis ĝisfundan esploron de la temo, rilate al la dungokontrakto. Konvenas konsulti la direktorojn de ĵurnaloj. La Komitato petis la Internacian Laboroficejon, ke ĝi klopodu por havigi la opiniojn de spertuloj kaj eventuale invitu ilin ĉeesti la sekvontan kunvenon.

La Komitato poste diskutadis la demandon pri elpensaĵoj. Estis tute ne eble akordigi la opiniojn esprimitajn unuflanke de S-roj Lambert-Ribot kaj Olivetti, kiel reprezentantoj de industriistoj, kaj aliaflanke de S-roj Gallié kaj Latham kaj ĉiuj aliaj reprezentantoj de profesiaj asocioj. La Komitato decidis daŭrigi la esploradon de la demandoj pri salajrataj elpensantoj kaj elpensaĵoj de salajruloj. Ĝi petis la Internacian Laboroficejon, ke ĝi havigu pliajn informojn pri tiuj temoj kaj konsultu la Internacian Oficejon pri Industria Posedado en Bern.

# Progreso pri konfirmo de konvencioj

| STATO | Washington 1919 | | | | | | — | Genova 1920 | | | Genève 1921 | | | | | | | Genève 1925 | | | | Genève 1926 | | | Genève 1927 | | Sumo da konfirmoj |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | |
| Argentino | □ ◣ | □ ◣ | □ ◣ | □ ◣ | □ ◣ | □ ◣ | * | □ ◣ | □ ◣ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | | | □ | | | | | | | |
| Aŭstralio (v. noton 3) | | | | | | | B * | | * | ■ ◎ | | | | | | | | | | | | | | | | | 1 |
| Aŭstrio | X * | ■ ⋈ | | ■ ⋈ | | ■ ⋈ | B * | | | | ■ ⋈ | ■ ◎ | ◣ | ■ ⋈ | | | | * | ■ * | ■ * | □ ◣ | ■ Y | | | ◣ | ◣ | 10 |
| Belgio | ■ ⋈ | | | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | B * | ■ ◣ | ■ ◣ | ■ ⋈ | ■ * | ■ ◎ | ◣ | ■ ⋈ | ■ ◎ | ■ ◣ | ■ ◣ | ■ ◣ | ■ * | ■ * | | ■ * | ■ ◣ | ■ ◣ | | | 19 |
| Bolivio | ◣ | | | ◣ | | ◣ | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | — |
| Brazilo | □ ◣ | □ | □ ◣ | □ ◣ | □ ◣ | □ ◣ | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | — |
| Bulgario* | ■ ◎ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ◎ | ■ ⋈ | ■ ◎ | B | ■ ◎ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ◎ | ■ ⋈ | ■ ◣ | ■ ◎ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | | | 16 |
| Cehoslovakio | ■ ◎ | □ ◣ | □ ◣ | ■ ◎ | ■ ◎ | □ ◣ | B * | | | ◣ | ■ ◎ | ■ ◎ | | ■ ⋈ | ■ ◎ | | | ◣ | ◣ | ■ * | □ | ■ * | | | ● * | ● * | 9 |
| Cilio | ■ ⋈ | □ * | ■ ⋈ | □ ◣ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ◣ | □ * | □ ◣ | □ ◣ | □ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ | ■ ◎ | □ | □ | | | | | | | | | | 8 |
| Cinujo | * | | * | | * | * | B * | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | — |
| Danujo | | ■ ⋈ | | | ■ ⋈ | ■ ⋈ | A * | ■ ⋈ | | | | * | ■ ◎ | | * | ■ ⋈ | * | | | ■ * | | | | | | | 7 |
| Estonio* | □ ◣ | ■ ◎ | | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | B * | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ◎ | ■ ◎ | ■ ◎ | ■ ◎ | ■ ◎ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | □ | □ | □ | □ | · | □ * | ■ * | | | 15 |
| Finnlando* | ◣ | ■ ⋈ | ◣ | □ ◣ | ● ◣ | ● ◣ | B * | ■ ⋈ | | ■ ◎ | ◣ | ■ ◎ | □ ◣ | □ ◣ | ■ ◎ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | □ ◣ | ■ * | ■ * | ■ * | □ * | □ ◣ | □ ◣ | ◣ | | 10 |
| Francujo | X * | ■ ⋈ | □ * | ■ ⋈ | | ■ ⋈ | A * | | ● ◣ | ■ * | | □ * | ■ * | ■ ⋈ | ■ ◎ | ■ * | ■ * | □ ◣ | □ ◣ | ■ * | □ ◣ | | ■ * | □ * | * | * | 12 |
| Germanio | □ ◣ | ■ ⋈ | ■ * | □ ◣ | □ ◣ | □ ◣ | A * | □ ◣ | □ ◣ | ■ ⋈ | □ * | ■ ◎ | ■ ◎ | □ ◣ | □ * | □ ◣ | □ ◣ | ◣ | ■ Y | ■ Y | * | □ | | | ■ * | ■ * | 9 |
| Granda Britlando | | ■ ◎ | | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | A * | ■ ⋈ | ■ ⋈ | | | ■ ◎ | ■ ◎ | | | ■ ⋈ | ■ ⋈ | | ■ * | ■ ◎ | | X * | | | | | 13 |
| Greklando | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | * | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | □ * | □ * | □ * | ■ ⋈ | ● | | | □ ◣ | □ ◣ | □ * | □ * | | | | | | 10 |
| Hindujo | ■ ⋈ | ■ ◎ | | ■ ⋈ | * | ■ ◎ | B * | ◣ | ◣ | | | ■ ◎ | | | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | | ■ * | ■ * | | ■ * | | | | | 11 |
| Hispanio | □ * | ■ ⋈ | ■ ⋈ | □ | □ | □ | A * | ■ ⋈ | ■ ⋈ | □ | □ | □ | □ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | | | | | | | | | | 8 |
| Hungario | | ■ * | ■ * | ■ * | | ■ * | B | ■ * | | | ■ * | ◣ | ● | X | ● ◣ | ■ * | ■ * | ■ * | ■ * | ■ * | | | | | ■ * | | 13 |
| Irlanda* Libera Ŝtato | | ■ ◎ | | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | A * | ■ ⋈ | | | ■ ⋈ | ■ ◎ | ■ ◎ | | | | | | ■ * | | | | | | | | 9 |
| Italio | X * | ■ ◎ | ● | ■ ⋈ | ● | ■ ⋈ | A * | ● | ■ ◎ | ■ ◎ | ■ ⋈ | ■ ◎ | □ * | ● ◣ | ■ ⋈ | ■ ◎ | ■ ⋈ | ◣ | ◣ | ■ * | * | | ● | ● | | | 12 |
| Japanujo | | ■ ⋈ | * | * | ■ ⋈ | * | B * | ■ ⋈ | | ■ ⋈ | ■ ◎ | | | | | * | ■ ⋈ | | ■ Y | ■ Y | | ■ Y | □ | □ | | | 9 |
| Kanado (v. noton 3) | | | | | | | A * | ■ * | ■ * | | | * | | | | ■ * | ■ * | | | | | | | | | | 4 |
| Kubo | ● | | ■ Y | ■ Y | ■ Y | ■ Y | | ■ Y | ■ Y | ■ Y | | | | ■ Y | ● | ■ Y | ■ Y | ■ Y | ■ Y | ■ Y | ■ * | ● | ■ Y | ■ Y | | | 16 |
| Latvio* | X * | □ | ■ ⋈ | □ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | | ■ ◣ | X Y | ■ ⋈ | □ | ■ ⋈ | □ | ■ ◣ | ■ ⋈ | ■ ◣ | ■ ⋈ | ■ Y | □ | ■ Y | □ * | □ | □ | □ | □ | □ | 14 |
| Luksemburgo | ■ Y | ■ * | ■ Y | ■ * | ■ Y | ■ | A * | ■ Y | ■ Y | ■ Y | ■ * | ■ * | ■ * | ■ Y | ■ * | ■ Y | ■ Y | ■ * | ■ Y | ■ * | ■ Y | ■ Y | ■ Y | ■ Y | ■ Y | ■ Y | 25 |
| Nederlando | □ | ● ◣ | □ | ■ ⋈ | ■ Y | ■ ⋈ | A * | ■ ⋈ | ● ◣ | ● ◣ | □ * | ■ ◎ | ■ ⋈ | ● ◣ | ● | ● ◣ | ■ * | ■ * | ■ | * ■ | □ ◣ | ■ Y | ● ◣ | ● ◣ | | | 11 |
| Norvegujo | | ■ ⋈ | □ | | | | A * | ■ * | * | ■ ◎ | | * | | | | ■ * | | | ◣ | ◣ | | | | | | | 4 |
| Paragvajo | □ | □ | □ | □ | □ | □ | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | — |
| Polujo | * | ■ ⋈ | □ * | * | ■ ⋈ | ■ ⋈ | B * | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ◎ | ■ ◎ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ◎ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | □ | □ ◣ | ■ * | □ | | □ | □ | | | 14 |
| Portugalo | ■ Y | | | | | | | | | | | | | | ■ Y | | | □ | □ | □ | | | | | | | 2 |
| Rumanio | ■ * | ■ ⋈ | ■ * | ■ * | ■ * | ■ * | B | ■ * | | | | | | ■ ◣ | ■ ⋈ | ■ * | ■ * | | | | | | | | | | 11 |
| Regno de la Kroatoj, Serboj kaj Slovenoj | * | ■ * | ■ * | ■ * | ■ * | ■ * | | ■ * | | | | | | | ■ * | ■ * | ■ Y | ■ * | ■ * | ■ * | | | | | | | 12 |
| Svedujo | * | ■ ◎ | ◣ | | ◣ | | B * | ■ ⋈ | | ■ ◎ | ■ ◎ | ■ ◎ | ■ ◎ | ■ ⋈ | | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ * | ◣ | ■ ◎ | | | | | | | 11 |
| Svislando (v. noton 3) | | ■ ⋈ | | ■ ⋈ | ■ ⋈ | ■ ⋈ | A * | | | | | | | ◣ | * | | | | ■ * | ● | | | | | | | 5 |
| Sudafriko | | ■ ◎ | | ■ ◎ | | | A * | | | | | | | | | | | | | ■ ◎ | | | | | | | 3 |
| Urugvajo | □ | □ ◣ | □ | □ ◣ | □ ◣ | □ ◣ | | □ ◣ | □ ◣ | □ ◣ | □ ◣ | □ | □ | □ ◣ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | □ | — |
| Sumo da konfirmoj | 13 | 23 | 11 | 19 | 28 | 21 | | 21 | 12 | 16 | 12 | 17 | 12 | 16 | 16 | 20 | 20 | 8 | 14 | 20 | 3 | 8 | 4 | 4 | 3 | 2 | 333 |

Konvencioj.

*1-a Konferenco, 1919.*

1. Laborhoroj.
2. Senlaboreco.
3. Akuŝo.
4. Nokta laboro, virinoj.
5. Minimuma aĝo (industrio).
6. Nokta laboro, infanoj.
7. Blanka fosforo (*).

*2-a Konferenco, 1920.*

8. Minimuma aĝo (surŝipe).
9. Senlaboreco, kompenspago.
10. Dungiĝo de maristoj.

*3-a Konferenco, 1927.*

11. Minimuma aĝo (agrikulturo).
12. Rajtoj je asociado (agrikulturo).
13. Kompenso pro laborakcidentoj (agrikulturo).
14. Plumboblanko.
15. Semajna ripozo (industrio).
16. Minimuma aĝo (hejtistoj kaj karbordigistoj).
17. Kuracista ekzameno de junuloj (laborantaj surŝipe).

*7-a Konferenco, 1925.*

18. Kompenso pro laborakcidentoj.
19. Kompenso pro profesiaj malsanoj.
20. Egaleco de traktado (laborakcidentoj).
21. Nokta laboro en bakejoj.

*8-a Konferenco, 1926.*

22. Inspekto de elmigrantoj surŝipe.

*9-a Konferenco, 1926.*

23. Dungokontraktoj de maristoj.
24. Reenpatrujiĝo de maristoj.

*10-a Konferenco 1927.*

25. Asekuro kontraŭ malsano (Industrio, ktp).
26. Asekuro kontraŭ malsano (Agrikulturo)

*Konfirmo.* — ■ Registrita ĉe Ligo de Nacioj. X Kondiĉa aŭ kun prokrastita apliko. ● Aprobita de la Kompetenta nacia aŭtoritato. □ Rekomendita por aprobo al la Kompetenta nacia aŭtoritato.

*Apliko.* — ◎ Leĝoj aŭ aliaj aranĝoj antaŭ ol la Konferenco akceptis la Konvencion. ⋈ Leĝoj aŭ aliaj aranĝoj faritaj post la akcepto de la Konvencio. Y Limtempo por raporto ne ankoraŭ pasinta.

NOTO. — Tiuj signoj estas uzataj por montri sciigojn komunikitajn al la internacia Laboroficejo per jara raporto pri aranĝoj faritaj por efektivigi konfirmitajn Konvenciojn, raportoj faritaj laŭ Artikolo 408 de la Kontrakto de Versailles.

* Leĝoj faritaj. ◣ Leĝoj proponitaj aŭ preparataj.

NOTO. — Tiuj signoj estas uzataj por montri sciigojn el ĉiaj oficialaj fontoj pri aliaj aranĝoj aplikantaj konvenciojn aŭ kun tendenco al apliko de ili.

*Notoj.* — 1. Nenia sciigo estas ricevita de la Internacia Laboroficejo pri aranĝoj faritaj aŭ proponitaj por konfirmo aŭ apliko de Konvencioj de la jenaj membroj de la Organizaĵo: Albanio, Kolumbio, Kosta Rika, Dominika Respubliko*, Etiopio*, Gvatemalo, Haiti, Honduraso, Liberio, Litovio*, Nova Zelando***, Nikaragvo, Panamo, Persio, Peruo, Salvadoro, Siamlando, Venezuelo.

2. La Ŝtatoj signitaj kun * fariĝis membroj de la Organizaĵo je la jenaj datoj: Bulgario 1920; Finnlando 1920; Luksemburgo 1920; Estonio 1921; Litovio 1921; Latvio 1921; Hungario 1922; Irlanda Libera Ŝtato 1923; Etiopio 1923; Dominika Respubliko 1924.

3. La karto ne montras, ĉe federacioj, informojn komunikitajn al la Oficejo pri leĝfarado en la apartaj Ŝtatoj, Provincoj k.t.p.

* La Berna Konvencio pri Blanka Fosforo konsistigis la temon de unu el la Rekomendoj de Washington. Ŝtatoj kiuj jam estis aliĝintaj al la Konvencio estas montritaj per la signo A en Kolono, 7, kaj ŝtatoj, kiuj poste aliĝis, per la signo B.

*** Aliĝis al la Konvencio pri Blanka Fosforo 1911.

# PAĜO PRI KOOPERADO

**Ĉeĥoslovakio : Organizo de Kooperativaj Laktejoj**

La tuta produkto de lakto en Ĉeĥoslovakio estas taksita kiel 45.000.000 hektolitroj, kiu valoras 7 miliardojn da kronoj. Nur 25 por cento de tiu lakto estas submetata al industriaj procedoj. La resto estas uzata por la nutrado kaj grasigo de bovidoj, la fabrikado de butero kaj fromaĝo en la farmbienoj, konsumata de la kamparanoj aŭ liverata por la konsumado de la urbanoj.

Notinda fakto estas, ke 75 por cento de la lakto submetata al industriaj procedoj estas liverata al kooperativoj.

Ekzistas nuntempe 560 laktaj kooperativoj en la lando, kiu havas 15 milionojn da loĝantoj. Tiuj kooperativoj estas grupigataj en unuiĝoj, unu por Bohemujo, unu por Moravio kaj unu por Slovakio, kaj alligitaj al diversaj centraj unuiĝoj, kiuj siavice apartenas al la « Centrokooperative », la granda konfederacio de la agrikulturaj kooperativoj de Ĉeĥoslovakio.

La plej gravaj de la unuiĝoj estas tiu de Bohemujo, la Unuiĝo de Ĉeĥaj Laktaj Kooperativoj, kiu grupigas 174 kooperativojn.

Ĉi tiuj ampleksas grandajn laktejojn liverantojn de 15.000 al 30.000 litroj ĉiutage en la grandaj urboj, distriktajn laktejojn liverantajn de 5.000 al 15.000 litroj kaj malgrandajn komunumajn laktejojn liverantajn de 1.000 al 4.000 litroj.

La celoj de la unuiĝo estas:

1. Fondi novajn kooperativojn,
2. Kontroli la produktadon pri kvantoj,
3. Kontroli la produktadon pri kvalito,
4. Centraligi la vendon de produktaĵoj.

Por la fondado de novaj kooperativoj, la Unuiĝo posedas arĥitekturan servon, kiu faras la planojn de konstruaĵoj kaj kontrolas ilian realigon. La Unuiĝo aĉetas la maŝinaron kaj kontrolas ĝian metadon. La Unuiĝo ankaŭ havigas al la nova kooperativo direktoron edukitan en laktista lernejo kaj bone provitan. Ĉiu laktejo estas regule vizitata de unu de la 12 inspektoroj de la Unuiĝo.

La inspektoroj kontrolas la konton de la kooperativoj, korektas la metodojn de fabrikado kaj inspektas la produktadon ĉe la kooperantoj. Ili donas praktika konsilojn pri la aranĝo de la staloj, pri nutrado kaj pri higienaj zorgoj dum manipulado de la lakto.

Dank'al tiu kunordigita klopodado, la lakto liverata al la laktejoj estas pura, malgraŭ tio, ke la malvastaj establaĵoj kaj ilaroj de la Ĉeĥoslovakaj kamparanoj estas ofte tre primitivaj, kaj la kvalito de la fabrikaĵoj estas tre regula.

Ĉiu kooperativo vendas siajn produktaĵojn en sia distrikto kaj liveras la reston al la vendosocieto alligita al la Unuiĝo, kiu posedas vastan establaĵon en Praĥa, kaj vendas interne kaj ekstere la produktaĵojn de la laktaj kooperativoj.

En ĉiuj laktejoj la prezo de la lakto ne estas fiksata por litro, sed por 10 gramoj de graso.

**Finnlando : La kooperativaj laktejoj**

La Monata Buletno de la Banko de Finnlando por Julio eldonis tre informplenan artikolon de S-ro A. Roussi, Konsilanto pri laktejoj al la Centra Kooperativa Asocio por Butereksporto « Valio », pri la historio de kooperativaj laktejoj en Finnlando.

La movado komenciĝas nur post kiam la Leĝo pri kooperativaj societoj efikis, la 1an de Septembro 1901, sed la kooperativaj laktejoj tre rapide anstataŭis la privatajn entreprenojn. Je la fino de 1926 restis nur 44 laktejoj posedītaj de kompanioj kaj 71 posedītaj de individuoj, dum la nombro da kooperativaj laktejoj estis 644. La nombro en 1904 estis 145, kaj en 1912, 389. La privataj laktejoj estas ne nur malpli multaj, sed ankaŭ multe pli malgrandaj ol la kooperativaj.

Membreco de kooperativaj laktejoj estas limigita al posedantoj de bovinoj, kiuj posedas iom da partoj en la societo, kiom ili posedas da laktobovinoj.

La 644 laktejoj ekzistantaj en 1926 estis klasifikataj jene. La tabelo ankaŭ enhavas la respondajn ciferojn por 1916 kaj la provizorajn ciferojn por 1927.

| | 1916 | 1926 | 1927 |
|---|---|---|---|
| Separatorlaktejoj ............ | 367 | 525 | 558 |
| Radiatorlaktejoj ............... | 45 | » | » |
| Fromaĝofabrikantaj laktejoj .. | 13 | 24 | 24 |
| Laktovendosocietoj ........... | » | 85 | 88 |
| | 425 | 644 | 670 |

Krom la 24 fromaĝofabrikantaj laktejoj en 1926, 49 el la separatorlaktejoj fabrikis ne nur buteron, sed ankaŭ fromaĝon. Tiel la tuta nombro da laktejoj fabrikantaj fromaĝon estis 73.

La jenaj ciferoj montras la kreskadon de la membreco de kooperativaj laktejoj dum la lastaj jaroj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1920............ | 46.000 | 1924............ | 56.300 |
| 1921............ | 48.600 | 1925............ | 61.200 |
| 1922............ | 50.400 | 1926............ | 65.400 |
| 1923............ | 53.500 | | |

El la membroj en 1926, 37, 1 % posedis de 1 al 3 bovinoj, 56,42 % de 4 al 15, dum nur 6,5 % posedis pli ol 15 bovinojn.

La nombro de bovinoj provizantaj la laktejojn multe pli grandiĝis dum la lastaj jaroj, kiel la jenaj ciferoj montras:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1920............ | 300.000 | 1924............ | 360.000 |
| 1921............ | 314.000 | 1925............ | 383.000 |
| 1922............ | 322.700 | 1926............ | 407.200 |
| 1923............ | 340.200 | | |

Malgraŭ tiu pligrandiĝo, la nombro en 1926 konsistigis nur 31,5 % de la bovinoj en la lando. La ebleco de plia kreskado en la kooperativa movado estas tial ankoraŭ tre granda.

Dum la jaroj de 1921 al 1926 la kooperativaj laktejoj ricevis la jenajn kvantojn da lakto, fabrikis la jenajn kvantojn da butero kaj fromaĝo:

| Jaro | Lakto ricevita : | | Butero | Fromaĝo |
|---|---|---|---|---|
| | Milionoj da Kg. | Po Kg. por bovino. | Milionoj da Kg. | Milionoj da Kg. |
| 1921 | 285,0 | 1.049 | 9,6 | 1,6 |
| 1922 | 327.6 | 1.053 | 10,9 | 1,6 |
| 1923 | 364,3 | 1.118 | 12,3 | 1,8 |
| 1924 | 406,4 | 1.172 | 13,3 | 2,9 |
| 1925 | 498,3 | 1.324 | 16,7 | 3,2 |
| 1926 | 549,2 | 1.380 | 18.8 | 3,1 |

*(Daŭrigo en la proksima numero).*